

sudopirinea esperanto-federacio jarraporto 2005–2006

1. LA FEDERACIO

Membroj : proks. 100.

En la asocio membras la anoj de du lokaj asocioj : Esperanto Kultur-Centro de Tuluzo (80) kaj Cercle d'études espérantistes de l'Ariège (CEEA) (20) ; kaj dekkvino da individuaj membroj de Espéranto-France, kiuj estas parte la samaj. Sume centoj da membroj.

La esenca agado de la federacio estas cirkuligi informojn inter la membroj pri agadoj de ĉiuj, kaj kontaktigi ĉiujn aktivulojn de la diversaj departementoj, por pli efika agado.

Kunvenoj

La jarkunveno okazis en Tuluzo, okaze de Zamenhof-festo, la 10^{an} de decembro 2005. Kvar departementoj (09, 12, 31, 65) estis reprezentitaj.

Cirkulero

Tri *Cirkuleroj de Midi-Pyrénées* aperis : en okt. 2005, en feb. 2006 kaj en junio 2006 (tiu lasta komune kun *La Krokodilo*). Sendita larĝskale interrete, kaj perpoŝte nur al kotizantoj.

Ekspozici-paneloj

La 12-panela nova ekspozicio (aĉetita de la federacio al UFE) estis uzita ofte, ĉefe en Tuluzo, sed ankaŭ en Ariejo, en Tarbes kaj en Aveyron.

Eksteraj rilatoj

Sekeve de la septembra publikigo de la Grin-raporto fare de Haut Conseil pour l'évaluation de l'école (Ministerio pri Junularo kaj Edukado), André Andrieu, interkonsente kun UFE, sendis al ĉiuj deputitoj kaj eŭrodeputitoj de la regiono leteron kun raporto-eltiraĵoj. El 36 deputitoj kontaktitaj, nur unu respondis ¹.

Rilatoj kun Espéranto-France

Ni estas en kunlaboraj rilatoj. La prezidanto Jeanne-Marie Cash reprezentis la federacion ĉe du

1. La asistanto de Gérard Onesta respondis tiel : « *Monsieur Onesta a bien pris connaissance du rapport, et vous en remercie. La défense des langues dites "minoritaires" est une des priorités du mandat de Monsieur Onesta. Il participe ainsi au groupe de travail sur la défense des langues du Parlement européen. Je vous fais passer en attache deux documents de travail qui précisent la politique de l'Union européenne en matière de langues.* »

komitatkunvenoj en Parizo kaj en Rennes (UFE-kongreso), sed en septembro 2006 neniu reprezentis nian regionon ĉe la komitatkunveno de UFE malgraŭ tiutema (reta) alvoko.

Kultura agado

Sur tiu tereno la federacio malmulte iniciatas, lasante la lokajn asociojn fari la laboron. Tamen la estraro mobiliziĝis pri la subteno al la doktoriĝa disertacio ² de Ch. Lavarenne. La apogo por ke arieja departementa asocio involviĝu en la projekto finfine fariĝis sencela, ĉar Ch. Lavarenne preferis alian solvon.

2. ĈEFAJ AGADOJ DE LA ALIĜINTAJ ASOCIOJ KAJ IZOLITAJ MEMBROJ

Kursoj kaj konversacikluboj : 2 en Ariège (Mirepoix kaj Arrout), 6 en Haute-Garonne, 2 en Aveyron, 1 en Hautes-Pyrénées, 3 en Tarn (Albi kaj Lavaur).

Kvar semajnfinaĵ **staĝoj** okazis en Arrout (Ariège) kun du aŭ tri niveloj.

Informaj **standoj** estis multnombraj en Ariège (deko da), Haute-Garonne (10) kaj en Aveyron (10), okaze de lingvo-forumoj, asocio-festoj aŭ libro-foiroj, ktp. En Hautes-Pyrénées, partopreno en la Festivalo de la Tero, kaj standeto ĉe la loka bazaro ĉiun duan semajnon.

Eldonado : tuluza informbulteno *La Krokodil'* aperis 5-foje en la jaro, rete por tiuj kiuj havas aliron, papere por la aliaj membroj de EKC. Arieja revueto *Esperanto Pyrénées* ne plu aperas.

Lernejoj : intervenoj en liceoj. En Aveyron : **prelego** kaj instrua klubo en liceo de Villefranche de Rouergue. En Toulouse : **ekspozicioj** kun ĉeesto de klarigantino okazis en 7 liceoj, kaj kluboj en 2 mezlernejoj kaj unu liceo. Pliaj intervenoj okazis en la

2. Tiu studo, sub la profesora gvido de J.-C. Lescure, profesoro en Universitato de Grenoble kaj direktoro de la Ĵurnalista Altlernejo de Instituto pri Politikaj Studoj (IEP) en Parizo, jam ricevis aprobon de Espéranto-France (UFE), kiu salajrigis ekde majo, pere de « Foyer de culture internationale » (FCI/HIK), Christian Lavarenne (la verkanton) kadre de « contrat d'avenir » por tiu laboro. Aliflanke Ch. Lavarenne petis subvencion de Esperantic Studies Foundation (ESF) en San-Francisko por financi parton de tiu salajro, kaj ESF jam transdonis monon tiukadre al UFE.

interfederaciakonferenco

klasoj laŭpete de instruistoj. Profesia animantino zorgas pri tiu agado.

Kulturo

Prelegoj de eskterlandanoj : du ĉininoj estis akceptitaj en Tuluzo kaj en Lavour ; kubanino estis akceptita en Tuluzo kaj Ariège.

Tutsemajna **koruso-staĝo** estis, kiel ĉiujare, organizita de CEEA en Montferrier (Ariège) en novembro 2005, kun kataluna korusestro Carles Vela kaj dekduo da partoprenintoj.

Du **bibliotekoj** funkcias : unu en Ariège (Bibliothèque du Couserans et des Pyrénées, kiu transloĝiĝis de Balague al Saint-Girons) faka pri la Esperantaj periodaĵoj, kaj unu en Tuluzo.

La Regiona Belettra Centro (Centre régional des Lettres) kaj s^{ro} François Pic, ĝenerala sekretario de SFAIEO (Section française de l'Association internationale d'études occitanes), de CELO (Centre d'étude de la littérature occitane), de HSLF (Histoire sociale des langues de France) kaj komisiito de CROM (Centre

de ressources occitanes et méridionales) rilatis al Bibliothèque d'espéranto du Couserans et des Pyrénées.

Gazetaro

La loka **gazetaro** sufiĉe bone informas pri niaj eventoj (*La Dépêche du Midi*, *Journal de l'Ariège*), kaj en Tuluzo la asocio prizorgis ĉiusemajne du unuhorajn **radio-programojn** ĉe du lokaj radioj, el kiu unu estis re-disaŭdigita sur alia kanalo.

Unu paĝo titolita « Espéranto » estis dediĉita al Bibliothèque d'espéranto du Couserans et des Pyrénées en la profesia revuo **ARABESQUES** (n^{ro} 4410/12-2006, p. 14) eldonita de Agence bibliographique de l'enseignement supérieur. Kaj s^{ro} François Pic petis al Ch. Lavarenne artikolon por la regiona magazino **Midi-Pyrénées Patrimoine**, kiu estis farita kunlabore kun EKC kaj la federacia prezidantino, kaj kiu devus publikigi en la numero de januaro 2007.

*Raportis : Jeanne-Marie Cash,
prezidantino de la Sudopirinea Federacio*